

Bulgara ⁸⁷ ESPERANTISTO



ENHAVO

	Paĝo
I. Keremiĉiev — Esperov. 50-jara jubileo de „Bulgara Esperantisto“	1
S. Petkov. Kiel naskiĝis „Bulgara Esperantisto“	3
A. D. Atanasov — Ada. La junaj jaroj ĉe „Bulgara Esperantisto“ . . .	5
G. Dikovski. Ni	9
A. Anĉev. La komandanto de la taĉmento Stojan Stojanov Vasilev (Boĵo)	10
B. Kavalĝiev, d-ro Z. B., C. Kolarov, Ĥr. Veceva, R. Georgieva, B. Drensk'. M., K. V. Organiza vivo.	11
* * * Tra la E-mendo.	14
V. Mitev. Respondo al nia leganto.	14
Parsifal (St. Masárov) Ni kaj Esperanto.	15
* * * Per la malgrandaj esperantistoj	16
* * * Distroj. Tra la gazetoro k. a.	

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukaresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Ŝuhova ul. D. 5/7 kv. 44, Moskva, M—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



50-JARA JUBILEO DE „BULGARA ESPERANTISTO“

Ekde sia apero (julio 1919) ĝis hodiaŭ „Bulgara Esperantisto“, malgraŭ la modesta formo kaj aspekto, ludis kaj ludas gravan rolon kiel forta propagandanto kaj batalanto de nia pacama afero. Ĝi obstine disvastigis kaj enpenetrigis la Internacian Lingvon Esperanto en la ĉiutagan homagadon kaj vivon, servis al la kunlaboro kaj la kompreniĝo inter la popoloj. Samtempe ĝi estis lerta organizanto kaj edukanto de la bulgara Esperantista Movado, historia kroniko de ĝiaj sukcesoj ĉe favoraj kaj malfavoraj cirkonstancoj.

Kune kun la tuta bulgara popolo kaj la demokratia esperantistaro „Bulgara Esperantisto“ suferis, ĝojis kaj solenis. Laŭ la kondiĉoj kaj depende de la sindonemo kaj la majstreco de siaj redaktantoj, dum la reakciaj reĝimoj nia organo certagrade helpis la batalon de la bulgara popolo kaj esperantistaro kontraŭ la faŝismo kaj militarismo, por demokratio, paco kaj interpopola amikeco.

Sed vere kolektiva organizanto, propagandanto kaj agitanto en la manoj de la Centra Komitato de Bulgara E-Asocio nia presorgano fariĝis post la Naŭa de Septembro 1944 jaro. Pli lerte, pli laŭplane kaj kolektive redaktata, ĝi jam estas vaste legata kaj serĉata de la esperantistoj. Pri tio elokvente parolas ĝiaj eldonkvanto kaj nombro de abonantoj, pli grandaj ol ĉe ĉiu ajn alinacia E-presorgano.

Per sia varia enhavo kaj diversaj rubrikoj „Bulgara Esperantisto“ prezentis al siaj legantoj interesan legaĵon: literaturajn materialojn — rakontojn, versaĵojn (tradukitajn kaj originalajn), vojaĝimpresojn k. s. Krome ĝi aperigis multajn artikolojn pri la historio de Esperanto, rememorojn, biografiajn notojn pri esperantistoj, kiuj pereis en la kontraŭfaŝisma batalo. Ĝi proponis ankaŭ liberan tribunon al societaj gvidantoj kaj aktivuloj por interŝanĝi organizajn spertojn, modelan aktivecon de E-societoj, estraroj, unuopaj agantoj. La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ zorgeme rilatis al siaj kunlaborantoj, helpis ilin. Tiel edukiĝis kaj elkreskis bonaj kaj kapablaj Esperanto-poetoj, verkistoj kaj tradukistoj, spertaj kaj sindonaj gvidantoj de la Asocio.

Grava tasko por niaj membroj estas la plialtigo de ilia lingva nivelo. Ankaŭ tiurilate „Bulgara Esperantisto“ ludis utilan rolon per la aperigataj artikoloj kaj notoj pri lingvaj demandoj kaj respondoj, verkitaj de bonaj spertuloj. Kompreneble tiurilate ĝi helpis ankaŭ per sia tuteca bona lingvaĵo.

Kiel en la kapitalisma pasinteco, ankoraŭ pli bone ĉe la nunaj favoraj cirkonstancoj nia ŝatata organo kontribuas ankaŭ por la konstanta plialtigo

de la kultura nivelo kaj socialisma konscio de siaj legantoj. Ĝi edukas la bulgarajn esperantistojn en spirito de socialisma patriotismo kaj vera internaciismo, de interpopola kunlaboro en ĉiuj sferoj de la homa kaj socia agado, de frata amikeco kaj tutmonda paco. Ĝi laboras kaj batalas por efektivigo de egaleco kaj reciproka estimo inter ĉiuj rasoj kaj nacioj, por liberigo de la popoloj de ĉiuspeca sklavado kaj ekspluatado, por respekto de la homaj rajtoj kaj tuthomara solidareco.

Por la prospero kaj la venko de nia afero, en internacia skalo laboras la tutmonda E-Movado. Per sia organizanta, instruanta kaj edukanta agado la organo de CK de BEA aktive kontribuas por la realigo de multaj gravaj internaciaj entreprenoj kaj taskoj, celantaj la stabiligon kaj la plifortigon de la tutmonda E-Movado. „Bulgara Esperantisto“ apogas tiurilate vicon da entreprenoj de Universala Esperanto-Asocio kaj de Mondpaca Esperantista Movado. La E-Movado en nia lando okupas unu el la unuaj lokoj en la tutmonda E-Movado, ĉar kvante kaj kvalite ĝi estas forta kaj bone organizita. Per tio valoran kontribuon donis ankau nia presorgano. Kiel unu el la aŭtoritataj taĉmentoj de la E-Movado en la mondo, nia Bulgara E-Asocio per sia revuo, per siaj komitatanoj en UEA kaj delegitoj de universalaj kongresoj ĉiumaniere influas al la E-afero per sia ekzemplo, sperto kaj sukcesa laboro.

Kompreneble, en iuj jarkolektoj de „Bulgara Esperantisto“ oni povas rimarki gravajn mankojn, eĉ erarojn en ĝia redaktado, maltrafajn materialojn. Eĉ nun oni povas rekomendi multajn novajn ideojn por plua plibonigo de nia organo. Oni devas ankoraŭ variigi la enhavon laŭ temoj, pliriĉigi la rubrikojn kaj la ilustradon, pli lerte kaj arte disponigi la materialojn sur la paĝojn, plibeligi la tutecan aspekton de la revuo. Oni devas altiri kiel aŭtorojn pli multe da spertaj esperantistoj, publicistoj, verkistoj, plibonigi sian laŭplanan laboron — jen grava devo de la redakta kolegio de „Bulgara Esperantisto“. Samtempe la organo per siaj kritikaj materialoj kaj notoj devas pli akre batali por forigo de la eraroj kaj la mankoj en nia organiza kaj kulturklera agado, por plibonigo de nia multflanka laboro. Kaj plie: oni devas nepre plilargigi kaj plifortigi la reton de kunlaborantoj el la tuta lando, plialtigi ilian jurnalisman kvalifikon.

Memkompreneble, ĉion ĉi la redakcio faros per la helpo kaj la konstanta kunlaborado de la bulgaraj esperantistoj kaj de la Estraro de nia Asocio.

La popoldemokratia sociordo en nia Patrujo malfermis vastajn horizontojn por laboro kaj sukcesoj ankau por nialanda E-Movado. La Komunista Partio bone komprenas ĝian pozitivan rolon kaj ĉiuflanke subtenas ĝin. Ja oni scias, ke en la sanga kaj heroeca kontraŭfaŝisma batalo falis ankau centoj da bravaj kaj fidelaj al la popolo esperantistoj; centoj da aliaj suferadis en malliberejoj kaj polickoncentrejoj.


Okaze de la 50-jara jubileo de nia amata asocia organo „Bulgara Esperantisto“ ni bondeziras al ĝi ankoraŭ pli obstine labori kaj batali por la venko de nia Esperanto-afero, por la socialisma edukado de nia esperantistaro kaj direktigo de ĝiaj fortoj kaj klopodoj al plenumado de ĉiuj taskoj, kiujn la Bulgara Komunista Partio kaj la Popola Registaro starigas antaŭ nia popolo en la konstruado de socialismo kaj komunismo, en la batalo por paco kaj amikeco inter ĉiuj popoloj.

Vivu nia karega Esperanto-batalilo „Bulgara Esperantisto„!





BULGARA ESPERANTISTO



ABONPREZO:

Por Bulgarujo — 20 leva
Por Eksterlando — 5 spm.

ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

APERAS MONATE

Redakcio kaj administracio: Pl. „Sveta Nedelja“, № 6, Sofio.

JARO UNUA.

Numero 1.

Julio, 1919.

KIEL NASKIĜIS „BULGARA ESPERANTISTO“

de Simeon Petkov

Forportante milojn da homaj vivoj kaj detruante nemezureblajn materialajn kaj spiritajn valorojn, la Unua Mondmilito donis fortan baton ankaŭ al la bulgara kaj tutmonda Esperanto-Movado. Tial post ĝi tute ne estis facile restarigi ĉion akiritan dum la antaŭmilita periodo. Sed dank' al la obstina kaj sindona agado de kelkaj entuziasmigitaĵoj esperantistoj ne pasis longa tempo kaj la Movado ĉe ni denove ekmarŝis laŭ sia „voj“ elektita.

Sentante fortan bezonon de komuna ligilo, la Centra Propaganda Komitato de Bulgara Esperantista Societo, elektita en 1912, kunsidis je la 20 de junio 1919 kaj decidis „komenci la eldonadon de „Bulgara Esperantisto“ de la 1-a de julio, kiu aperos monate, 10 numeroj jare, 8 paĝoj, 15/24, je la komenco iom bulgara iom Esperanta tek-

sto kaj poste nur Esperanta“. Kiel Redakta Komitato estis elektitaj la ĝistiamaj membroj de CPK.

La ĝenerala jara kunveno de Bulgara E-Societo okazis la 24-an de aŭgusto 1919 j. Ĝi elektis novan CPK, kiu konstituigis jene: prezidanto Simeon N. Petkov, vicprezidanto Georgi Atanasov, sekretario Stefan Minkov, kasisto Milčo Georgiev, bibliotekisto Rale Bojaĝiev. Redakta Komitato: Simeon Petkov, G. Atanasov, Panajot Kolev, Rale Bojaĝiev kaj Georgi Gaŝevski.

Per fortaj vortoj mi denove substrekiĝis antaŭ tiu ĉi nia unua ĝenerala postmilita kunveno, fakte kongreso, la noblan celon de Esperanto kaj montris la vojon, kiun ĉiuj esperantistoj en Bulgario sekvu — per organizado kaj sindona laboro al la venko.





Simeon Petkov
(ĉirkaŭ 1919 j.)

Longan tempon ĉe la komenco de la E-Movado Bulgario okupis unu el la unuaj lokoj en la E-mondo. Nun, post la terura milito, ĝi denove komencis antaŭeniri.

Nur en la daŭro de kelkaj monatoj la nombro de la societaj membroj pli-grandiĝis multoble, kaj en pli ol 15 urboj kaj vilaĝoj formiĝis lokaj propagandaj komitatoj. Ekster la organizaĵo tamen estis centoj da aliaj esperantistoj, kiuj pro unu aŭ alia kaŭzo ankoraŭ ne organiziĝis en Bulgara E-Societo. Estis ankaŭ granda nombro de simpatiantoj, kiuj, ne estante ankoraŭ esperantistoj, kunsentis la ideon de la Lingvo Internacia kaj helpis nian aferon.

La Centra Propaganda Komitato atentigis ĉiujn societajn membrojn, ke la ricevo de nia organo „Bulgara Esperantisto“ estas deviga, kaj ĉiu samideano, pagante sian membrokotizon, pagu samtempe sian abonon.

Kunlaborantoj en la redaktado de „Bulgara Esperantisto“ dum ĝia unua

jaro estis: Ivan H. Krestanov, St. Min-kov, Atanas D. Atanasov, J. G. Kamilarov, G. Fandikov, Sam Mayer, D. Kocaliev, D. N. Grekov, D. T. Stanev, M. Milĉev, P. Georgiev k. a.

La eldonado de „Bulgara Esperantisto“ dum la unua jaro estas ligita kun multaj malfacilaĵoj pro manko de prespapero, literoj k. a. Sed iom post iom dank' al la sindona laboro de la Redakta Komitato kaj ĝiaj kunlaborantoj la malfacilaĵoj estis venkitaj.

Necesas mencii ĉi tie, ke „Bulgara Esperantisto“ ne naskiĝis sur „nuda loko“ — ĝi havas siajn antaŭulojn. En 1903 ni, kelkaj idealismaj junuloj en Sofio, fondis literaturan rondon, kiu baldaŭ fariĝis esperantista. Ĝi eldonis en novembro 1903 „Pârva Kraĉka“ en bulgara lingvo, kiu poste fariĝis esperantlingva kaj de novembro 1904 ricevis ankaŭ Esperantan nomon — „Unua Paŝo“. Tiu modesta gazeto aperis litografie ĝis decembro 1906 j., kiam ni decidis ĉesigi ĝin por komenci eldonadon de pli granda presata propaganda gazeto kun la nomo „Bulgara Esperantisto“. De ĝi en 1907 aperis nur 3 numeroj — pro diversaj kaŭzoj tiu iama „Bulgara Esperantisto“ ne povis vivi longe.

Ĉiuj ĉi iniciatoj ne estis longedaŭraj, sed ili fiksas la unuajn paŝojn kaj donis al ni spertojn por alpaŝi al la granda tasko — eldoni nian aŭtoritatan nacian organon „Bulgara Esperantisto“.

Festante kune kun ĉiuj bulgaraj esperantistoj la 50-jaran jubileon de nia asocia organo, mi el tuta mia koro bondeziras al ili sanon kaj feliĉon por povi paŝo post paŝo, per sistema kaj bone organizita laboro atingi novajn pli grandajn sukcesojn en la disvastigo kaj uzado de Esperanto por la bono de nia popolo kaj de la homaro, por kompreniĝo kaj paco inter ĉiuj popoloj.

Partoprenu la Literaturan Konkurson de „Bulgara Esperantisto“ dediĉitan al ĝia 50-a naskiĝjaro!



Duona jarcento. . . Periodo sufiĉa por ke suĉinfano fariĝu matura viro. Sed kiom da historiaj eventoj, da ventegoj kaj skuoj en la vivo de la popoloj dum tiuj kvindek jaroj! Kiaj profundaj ŝanĝoj en la ŝtatoj, en la socioj! Kaj tra tiu malglata vojo devis paŝi ankaŭ la bulgara Esperanto-Movado.

En la miloj da paĝoj de „Bulgara Esperantisto“, amasigitaj en la kurado de la jaroj, respeguliĝas la sinsekvaj ŝanĝoj en la vivo de la bulgara esperantistaro, ĝiaj esperoj, iniciatoj, bataloj, streĉoj, triumfoj, stagnoj, dekadencoj, revigliĝoj. . . kaj persisteco!

La iniciato de 1919 fakte estas realigo de decido, prenita sep jarojn pli frue — en 1912. Por kompreni bone la cirkonstancojn kaj — sekve — por taksii la signifon de tiu ĉi realigo, necese estas scii iujn faktojn el la historio de la bulgara Esperanto-Movado. La enhavo, direkto kaj karaktero en diversaj periodoj de la vivo de l'gazeto estas intime ligitaj kun la stato de la Movado kaj ĝiaj bezonoj en la respektiva periodo, kaj la stato mem dependas en alta grado de la ĝenerala socia kaj politika situacio.

En 1911 la Bulgara E-Ligo (BEL) travivas organizan krizon. Solvon oni trovas en ĝia transformigo en Bulgaran Esperantistan Societon (BES). La Movado ankoraŭ stagnas en 1912. Organo de BES estas la komuna bulgara-rumana gazeto „Danubo“, presata en Bukureŝto. Sed ĝi komencas malfortiĝi pro nesufiĉa nombro de abonantoj kaj post sia 7-a numero (julio 1912) ĉesas aperi. Intertempe revigliga fakto por la bulgaraj esperantistoj estas la prelego de prof. d-ro Iv. D. Ŝiŝmanov en la Sofia Universitato. La sofiaj esperantistoj faras streĉojn por utiligi tiun ĉi sukceson kaj reaktivigi la samideanojn en la lando. Mi citos parton el miaj

„Rememoroj“ pri tiu periodo: „En la fino de la somero de 1912 la Bulgara E-Societo jam havis sian unuan jar-kunvenon (kongreson). Estis pasinta tuta jaro en organiza laboro kaj ni intencis jam alpaŝi al pli vasta kaj serioza laboro por propagando. La jar-kunveno elektis novan komitaton kun prezidanto Simeon Petkov kaj sekretario Ivan Nenov. Ni estis sukcesintaj altiri al ni ankaŭ la homojn de la dua esperantista generacio en nia lando, kiuj ĝis nun staris ekster la Movado. La unua tasko de la nova Komitato estis komenci la eldonadon de presorgano kaj garantii ĝian ekziston. Ni decidis komenci la eldonon de monata dulingva propaganda gazeto „Bulgara Esperantisto“. Por garantii ĝian vivon, ni organizis specialan fonduson: ĉiu el ni promesis pagadi monate 5 aŭ 10 levojn por presigo de unu gazetnumero. Ĉio estis preta. Ni traktis kun presistoj kaj preparadis jam la materialon por la unua numero de la gazeto. La afero marŝis plenvaporo. Ni estis sur la sojlo de nova epoko, en kiun ni estis alpaŝintaj kun granda kredo kaj kuraĝo. . .“

Mi aldonos al tiuj informoj: por redaktado de la gazeto oni elektis min.

Sed la eksplodo de la Balkana Milito en septembro 1912 paralizis plene ĉian agadon. Post la malfeliĉa fino de la milito en 1913 la vivo en la lando estis nenormala, oni ne povis entrepreni seriozajn kulturajn iniciatojn. La decido pri „Bulgara Esperantisto“ restis nerealizita. En 1914 venis nova milito — la Unua Monda Milito, en kiun Bulgario enpaŝis en 1915. Denove stagno de la kultura vivo. En la aŭtuno de 1918 — fino de la milito, katastrofa por Bulgario. La nuna generacio apenaŭ povus havi ideon pri la situacio en tiu tempo. Mizero ĝenerala — neevitebla sekvo de la daŭra

stagno de produktado, industria kaj agrikultura, malorganizita ekonomiko, manko de sufiĉaj proviantoj por nutrado de la popolo, manko de necesaj materialoj por produktado. . . La lando — blokita je ĉiuj limoj, nenia komerco kun aliaj landoj, nenia enporto de varoj. Malproporcieco inter salajroj kaj prezoj. Konfuzo kaj neorientebleco. Kiam ni aŭdis, ke 100 svisaj frankoj, kiuj antaŭ la Mondmilito egalas 100 bulg. levojn, nun kostas 450 levojn, konsterno frapis nin: ni estas ruinigitaj! Sed kia estis la teruro, kiam baldaŭ ni eksciis la multe pli malbonan efektivan staton: ne 450, sed 2700 levojn kostas 100 sv. frankoj! Kaj super tiu ĉi malgaja bildo — nigra minaca nubego: neimageble granda ŝarĝo de pagotaj reparacioj. . .

Imagu la spiritan staton de la popolo, kiu ankoraŭ ne revenis al sia normala vivo kaj anhelis pro la streĉo dum la militaj jaroj. Prediki ideojn pri internacia lingvo? Ĉu malfermiĝus oreloj por tia prediko? Kian moralan forton, kian profundan ideocon devus havi homo, por kuraĝi ĉe tia situacio rekomenci la interrompitan agadon por Esperanto?

Kaj feliĉe — herooj troviĝis. Malmultaj, sed harditaj en la antaŭmilita laborado. La malnova Centra Komitato de BES ne povis restariĝi en sia konsisto de 1912. La restintaj en Sofio membroj kolektiĝis ĉirkaŭ la prezidanto de 1912 Simeon Petkov. Mi persone revenis el militkaptiteco en novembro 1918, tuj trovis vakantan lokon por gimnazia instruisto en la malgranda urbeto Trn kaj deŝiriĝis de miaj kunagintoj de la pasinteco. Ivan Nenov — sekretario de 1912, same translokiĝis en Razgrad kaj ne plu rajtis resti membro de la Komitato. Ĉirkaŭ Sim. Petkov grupiĝis la malnovaj fervoruloj Panajot Kolev, Georgi Atanasov, Milĉo Georgiev, Stefan Minkov, Rale Bojaĝiev, Georgi Gaŝevski, Georgi Fandikov kaj kelkaj

aliaj. Malmultaj, sed kuraĝaj. El mia nova loĝloko mi estis en vigla korespondado kun tiuj ĉi amikoj, precipe kun P. Kolev, kiu regule kaj detale informadis min pri la laboroj, hezitoj, obstakloj ktp de la gvidantoj.

Malfacilaj taskoj staris antaŭ ili. Elsérĉi, altiri denove al aktiva partopreno en la Movado la restintajn el la antaŭmilita periodo esperantistojn en la lando, impulsi ilin, reveki kaj subteni ilian kuraĝon. En la sangaj militoj pereis valoraj agintoj de la pasinteco. Aliaj revenis lacaj, sen emo al socia kaj kultura agado. La malnova pioniro de Esperanto Petr Toŝkov skribis al mi pri la stato en lia vilaĝo Batak: „Mi revenis duonhomo laŭ sano post la terura imperiisma, eksterma kaj katastrofa milito. Ĉiuj kursanoj de la jaroj 1909—10—11, sciintaj la lingvon, pereis dum la militoj de 1912—13 kaj 1915—18.“

Sed feliĉe vice al la malmultaj pioniroj de la antaŭmilita periodo en kelkaj provincaj urboj elkreskis spontane novaj freŝaj fortoj. Dum la viroj estis sur la batalkampo, en Panagjuriŝte, Karlovo kaj Pazarĝik kelkaj junuloj gimnazianoj malkovris la ekziston de Esperanto, trovis iamaniere lernolibrojn, lernis la lingvon kaj formis lokajn grupetojn, kiuj starigis kontakton inter si. Ili ne estis ligitaj kun la pasinta Movado, ne konis ĝin, sed estis entuziasmaj kaj agodeziraj. Al tiu ĉi brava generacio apartenas Stojan Ĝuĝev (nun profesoro), Aleksandr Kurtev (nun arkitekto), la forpasintaj Cvetan Stajkov (poste profesoro), Cvetan Cvetkov, Dimitr Tuĝarov kaj aliaj. Ankaŭ tiun junan kaj fervoran taĉmenton devis altiri al komuna laboro la gvidantoj en Sofio.

Por tiuj ĉi taskoj estis necesega ligilo, presorgano. Estis tempo realigi la decidon de 1912. La cirkonstancoj por presigi kion ajn ankoraŭ estis tre malfavoraj. Papero estis deficitata varo.



Tamen la prezidanto Sim. Petkov sukcesis aranĝi la presadon en la presejo „Radikal“, fondita de la tiama Radikala Partio (al kiu apartenis Sim. Petkov; li estis ĝia elstara membro). Kaj jen, en julio 1919 naskiĝas la longe atendita „Bulgara Esperantisto“ kaj ĝia unua numero ĵetas lumon al la soifaj animoj de la malmulta anaro. Se mi bone memoras, komence ĝi havis ne pli ol 250 abonantojn.

La gazeto ekiris sur la malfacila vojo. Krom la financa problemo, multaj kaj seriozaj obstakloj estis venkotaj. Mankis sufiĉaj kunlaborantoj. La ĝeneralan redaktadon faris Sim. Petkov, li verkis la fruntartikolojn, sed la reston devis trovi kaj kompili Stefan Minkov. Mankis supersignitaj preslitteroj, kaj oni penis uzi en la Esperanta teksto nur vortojn, en kiuj ne estis tiaj literoj. Jam en la unua numero ni legas: „La redakcio posedos baldaŭ sian propran presalfabeton kaj ni esperas, ke de la venonta numero ni havos veran esperantan organon en Bulgario.“ Sed ankaŭ la 2-a numero estis sen supersignaj literoj: tiaj aperis apenaŭ sur la paĝoj de la 3-a numero¹.

En la duobla n-ro 5—6 ni legas: „Pro manko de prespapero iom malfruigis la eldonado de la numeroj 5 kaj 6 de „Bulgara Esperantisto“. La Redakta Komitato havigis nun la kvanton de prespapero necesan por la eldonado de „BE“ ĝis la fino de l'abonjaro.“

La bezono pri lerniloj estis tre akuta. Por iom mildigi ĝin, la gazeto publikigis en n-roj 3, 4, 5, 6 „Modelojn de Esperanta stilo“ — partojn el la Ekzercaro de la „Fundamento de Esperanto“. La redaktaj kaj presaj obstakloj trudis duoblajn numerojn ĝis la fino de la jarkolekto (5—6, 7—8, 9—10).

¹ Mi supozas, ke solvon oni trovis per pruntepreno de literoj de samideano G. Oreškov; li posedis tiajn proprajn, kaj ankaŭ mi havis okazon pruntepreni ilin.



Atanas D. Atanasov

(ĉirkaŭ 1912 j.)

En la dua duono de la jarkolekto estas sentata jam alfluo de novaj kunlaborantoj.

Mi ne povas aserti, ke la enhavo kaj precipe la lingvaĵo de la gazeto kontentigis min. Ofte la stilaj kaj gramatikaj eraroj ŝokis grave. Tamen ĉio ĉi devis esti tolerata kaj pardonata, konsidere al la penigaj kondiĉoj dum tiuj jaroj. Sed sciante, ke „Bulgara Esperantisto“ estis (kaj ĉiam restis) la sola Esperantolegaĵo por la plejmulto de la enlandaj esperantistoj, la lingva malperfekteco de la materialo estis vere dolora.

Dum aŭgusto 1919 okazis bone partoprenita kongreso de BES, en kiu mi, interalie, prezentis detalan planon por plua vasta propaganda agado. Tamen post tiu ĉi kongreso ekestis granda malstreĉo kaj malvigleco en la agado. Dum 12 monatoj la Centra Komitato kunvenis nur dufoje: komence — tuj post la kongreso, fine — en julio 1920, kiam ĝi decidis kunvoki la jaran kongreson je la 28-a de aŭgusto. La senageco de la gvida centro kaj la ne-

regula aperado de la organo donis sian sekvojn: malvigligo en la lando kaj malintereso al la kongreso — ĝin partoprenis nur 16 personoj! Mi mem ne povis ĉeesti ĝin. Sed oni jam sciis, ke mi revenos definitive en Sofion (mian naskiĝurbon), kaj oni elektis min membro de la Centra Komitato. En la nova Komitato estis elektitaj ankaŭ Simeon Petkov kaj Georgi Aktarĝiev (prezidanto de Bulgara E-Ligo kaj de ĝia heredinto — Bulgara E-Societo ĝis 1912), kiu jam devis ĉesigi la permesitan ripozon kaj reĵungiĝi denove en aktiva laboro. Ĉe mia reveno Panajot Kolev kaj Milčo Georgiev renkontis min per la vortoj: „Jam delonge ni atendas vin.“

Ĉe la konstituigo de la nova Centra Komitato kiel prezidanto estis elektita Georgi Aktarĝiev. Min oni elektis vicprezidanto kaj al mi donis la redaktadon de la organo, kun kunredaktoro Panajot Kolev.

Venis tempo por mi apliki mem la ideojn, kiujn mi prezentis al la Kongreso en 1919. Kiel mi agis kaj kion mi faris — tio apartenas al la historio, aliaj pritaksu ĝin.

Kiel redaktoro de „Bulgara Esperantisto“ mi havis en mia kapo pretan planon. La 12 paĝoj de la monataj kajeroj devis respondi al multaj bezonoj. La programon mi donis jam en la komenca artikolo de la 1-a numero de la II jarkolekto (novembro 1920). Por havigi al la bulgaraj esperantistoj taŭgajn argumentojn uzotajn en la batalo por Esperanto, mi havis planon pri serio de sinsekvaj artikoloj. Por la bezonoj de lernado de Esperanto, ĉe la tiama manko de lerniloj, mi enkondukis „paĝojn por novaj esperantistoj“. La informojn pri la alilanda Movado prizorgis P. Kolev, pri la enlanda — mi.

La laŭplana kaj streĉa laboro por la Movado ĝenerale kaj por la redaktado de ĝia organo komencis doni rezultojn. Sed paralele al la diskresko de la Movado aperis novaj problemoj por

la gazeto. Kiu interesiĝas pli detale, povas trasekvi ilin sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“. Pri tiu periodo — kaj mi aldonus: pri la signifo de la organo — mi citu la vortojn de la E-veterano Kiril P. Georgiev: ĝi donis direkton kaj tonon al la tuta Movado por multaj jaroj.

Mi ne intencas rakonti pri la obstakloj kaj malfacilaĵoj ĉe la presado: ofta manko de papero, vagado de presejo al presejo, difekta kompostado pro manko de esperantistoj-kompostistoj, abundegaj eraroj en la presprovaĵoj ktp. La traktadojn kun la presejoj prizorgis P. Kolev, la korektadon — mi. Malgraŭ la malfacilaĵoj la gazeto stabiligis kaj ekde la tria jarkolekto ĝia amplekso jam pligrandiĝis je 16 paĝoj.

Tiel mi direktis la redaktadon de „Bulgara Esperantisto“ ĝis 1925. Kian valoron havas la gazeto en tiu periodo — pri tio parolu aliaj. Ekde 1923 en la Redakta Komitato partoprenis ankaŭ Dimitr Simeonov (tiam sekretario de BES), en la VI jarkolekto jam P. Kolev ĉesigis sian partoprenon, sed anstataŭe en la komitaton venis Asen Grigorov k. a. La novaj cirkonstancoj en la vivo postulis ankaŭ ioman ŝanĝon en la direkto; mi estis jam iom laca kaj ne tre konvena, pro tio en la presata konsisto de la Redakta Komitato mi metis mian nomon lasta, kaj en la 3—4 numero mi forigis ĝin plene. Mia retiriĝo estis formale anoncita en n-ro 7 de la jarkolekto. Dum junio 1926 mi ekŝiĝis ankaŭ el la Centra Komitato kaj ĉesigis mian partoprenon en la gvidado de la landa Movado. (Mi detenas min ankoraŭ paroli pri la tiamaĵ rilatoj kaj ĉagrenoj). Tio daŭris ĝis 1927, kiam la granda krizo de la organizaĵo trudis al mi denove akcepti la prezidantan postenon kaj ankaŭ komenci provizore (ĝis la aŭtuno de 1928) redakti la gazeton.

En sia VII jarkolekto (septembro 1925 — junio 1926) „Bulgara Esperantisto“ fariĝis preskaŭ tute literatura



Ni venas — mil-miloj —
filinoj kaj filoj
de ĉiuj popoloj!
Ni jungis nin vole
per streĉa laboro:
ke batu la horo
de l' venko tutmonda —
Esper' triumfonta!

Ni venas — mil-miloj —
sen ajnaj armiloj,
sen ajnaj insidoj,
ni, teraj geidoj.
Ni ĵuris purkore:
labori fervore
kaj spite al baroj
por nova homaro,
por nova estonto —
Esper' triumfonta!

Ni venas — mil-miloj —
kun pensoj similaj,
samcelaj — en ago',
sub verdaj la flagoj,
ni — blankaj, ni — flavaj,
persistaj kaj bravaj,
ni — rondo tutmonda —
Esper' triumfonta!

(„BE“, № 4, 1939 j.)

gazeto, redaktis ĝin Asen Grigorov. La propagandajn taskojn de la organo alprenis la bulgarlingva ĵurnalo „Esperanto“, same oficiala eldonaĵo de BES.

La malboniĝinta financa stato de BES ne ebligis eldonon de la kutimaj 12 numeroj por tiu jaro — post la 10-a numero la gazeto ĉesis.

Por la daŭrigo en 1927 mankis mono. La 1-an numeron de la nova jarkolekto ni sukcesis eldoni dank' al malavara helpo de samideano Stojan Marev el Ĉepelare, kiu pagis la preselspezojn.

La plua vojo de „Bulgara Esperantisto“ estas pli — malpli konata al la plimulto de la nunaj bulgaraj samideanoj, sed malmultaj havus eblon legi la unuajn jarkolektojn — de ĝia juna aĝo. Ĉu ili povus prezenti intereson al la nuna esperantista generacio? Mi havis jam okazon vidi kun kia avido kaj plezuro antaŭ kelkaj jaroj, en kunveno

de la sofiaj esperantistoj, oni aŭskultis iujn artikolojn el la gazeto de tiu periodo. Kaj oni prave demandas: „Kia oni ne eldonas en aparta libro la valorajn artikolojn el la pasintaj jarkolektoj de „Bulgara Esperantisto“? Kial? — Al tia demando mi ne povas respondi, tamen mi ankaŭ estas konvinkita, ke tia libro estus ŝatata legaĵo por multaj samideanoj. Ĉar ofte la skribaĵoj el la pasinta tempo akcelas kaj inspiras.

Ekzistas antikva legendo pri Anteo, filo de Gea (la diino Tero): Herkulo luktis kun li, multfoje li forte puŝis lian korpon al la tero, sed ĉiam, post ĉiu puŝo, Anteo stariĝis pli forta: kiam li tuŝis la patrinon Teron, ŝi donis al li novan forton.

Same tiaj estas por ni la pasintaj jarkolektoj de nia „Bulgara Esperantisto“: kiomfoje ni enrigardas ilin, ni trovas alfluon de nova kuraĝo kaj forto por plua laboro.

LA KOMANDANTO DE LA TAĈMENTO STOJAN STOJANOV VASILEV (BOĴO)

La 25-an de septembro 1916. Unu mallonga sciigo senfortigas la piedojn de Rada Stojanica. Antaŭ ŝiaj okuloj turniĝas la malnova domo, la granda nukso, la arbaro sur „Ratlaka“, la rokoj de „Stanĉovica“: ie sur la militkampoj de Dobruĝa estas mortigita Stojan Vasilev, ŝia gaja, bona kaj saĝa domastro, la patro de ŝiaj kvin malgrandaj infanoj (la sesan ŝi jam sentas sub la koro). Kion fari? La korŝirantaj vekrioj de Rada rapide altiras — kiel malgrandajn birdetojn — la timigitajn infanojn kaj plorigas la tutan vilaĝparton.

Tage Rada Stojanica laboras, ploras kaj premas per pugnoj sian ventron. Nokte, kiam ŝi lacigite kuŝas sur la malmola lito, la apenaŭ perceptataj movoj de la nova vivo mildigas ŝin, kaj ŝi riproĉas sin pro la malbonaj pensoj. „Se naskiĝos knabeto, Stojan estos lia nomo, la nomo de la patro. Li estis tiel bona!“

Stojan Stojanov naskiĝis je la 17 de aprilo 1917. Li portis la plej bonajn kvalitojn de siaj gepatroj. Hejme Stojan estis laborema kaj obeema. Ĉiutage kun du sakoj sur la ŝultro, en unu — lernolibroj, en la alia — pano, li iris al lernejo en la najbara vilaĝo. Lia sciemo estis senlima. Dum la interlecionaj paŭzoj, dum la ripozetoj survoje, kiam paŝtis la ŝafojn aŭ la bubalojn, Stojan legis, legis. Konatiĝinte unufoje kun la libroj, kun la vero pri la vivo de la homoj, li ĝis la fino de sia belega vivo diligente lernis. Kiel gimnaziano li studis en Vraca kaj Ruse. Lia nomo troviĝas sur la paĝoj de gazeto „Rusenska Poŝta“ en la listo de la abituriintoj-perfektuloj. Krom la lecionoj li lernis ankaŭ stenografion, muzikon, rusan kaj italan lingvojn, maŝinskribon. Unu el liaj pasioj estis la Internacia Lingvo Esperanto. Pri tiu ĉi lingvo unue



li aŭdis de siaj pli aĝaj fratoj Vasil kaj Stanjo, lernis ĝin. Tial en Vraca Stojan vizitis Esperanto-kurson, gviditan de Radoslav Triĉkov. Liaj konoj pri germana kaj latina lingvoj bone helpis lin. Rapide Stojan ellernis Esperanton, komencis korespondi kaj mem fariĝis propagandanto de la lingvo.

Ĝis nun estas konservita unu lia 140-paĝa taglibro pri la periodo oktobro 1933 marto 1934, en kiu ĉiutage li skribis Esperante. Jen kelkaj linioj:

„ . . . Nun mi decidis havi fine de la dua trimestro ok sesojn kaj sep kvinojn. La sesan klason mi devas fini kiel privata lernanto . . . Mi estas malfeliĉa, ĉar mi ne havas eĉ unu groŝon . . . La pasintan vesperon ni havis permeson viziti amuzvesperon. Mi ne ĉeestis la literaturan parton, ĉar mi ne havis monon. Dum la amuza parto mi ne dancis, ĉar mia pantalono ne estas pantalono kaj la jako — jako . . . “

Dum la ferioj Stojan en sia naskiĝvilaĝo grupigis la gejunulojn, parolis



Ruse — E-Societo „Libero“. La jara kunveno okazis la 16-an de marto. Raporton pri la pasintjara agado tralegis la prezidanto Stojan Cvetkov. En la seriozaj diskutoj oni emfazis la neceson serĉi novajn, pli fruktodonajn formojn kaj metodojn de agado.

La kunvenon salutis Maria Preslavska — en la nomo de CK de BEA, Kostov — el la Fervojista E-Societo en Ruse „Ponto de l' Amikeco“ kaj Ĥristo Ĥristov — en la nomo de DK de BEA. Estis elektita nova estraro ĉefe kun prezidanto St. Cvetkov kaj sekretario M. Preslavska.

Fine oni akceptis telegramojn al CK de BKP, CK de BEA kaj protestan — kontraŭ la arogaj ĉenaj provokoj ĉe la ŝtatlimoj de USSR.

B. Kavalĝiev

V. Dve Mogili, distrikto de Ruse. La jara kunveno, okazinta la 16-an de marto j. k., registris tre bonajn sukcesojn, atingitajn dum la pasinta jaro. Jam nun 34 societaj membroj pagis sian membrokotizon por 1969 j., 24 abonis „Bulgaran Esperantiston“, 6 — aliajn E-perio-

daĵojn. Estis organizitaj multaj grupoj, kiuj lernas Esperanton: en la elementa lernejo — 5 geinstruistoj kun gvidanto Metodi Donĉev; en la filio de Bulgara Nacia Banko — 7 geoficistoj kun gvidanto Dafinka Gecova; en la poŝtejo — 5 geoficistoj kun gvidanto Velko Velkov; en la produkta kombinumo „Amikeco“ — 5 geoficistoj kun gvidanto Milka Kalinova; ĉe la sanitara servo — 5 sanlaboristoj kun gvidanto Veliko Neŝev. La gvidantoj de ĉiuj ĉi grupoj estas membroj de l'estraro de la tutvilaĝa E-Societo.

Krom tiuj ĉi grupoj el plenaĝuloj ekzistas ankaŭ grupo ĉe la loka komsomola organizaĵo (13 gejunuloj) kaj unu grupo de lernantoj en la mezgrada teknika lernejo — ambaŭ grupoj lernas Esperanton.

En la vilaĝo funkcias ankaŭ „parolanta rondo“ kun 14 partoprenantoj sub la gvido de d-ro Zaĥari Boĉev. Ili kunvenas ĉiuŝaŭde je la 18 h. en la Kulturdomo. La parolantan rondon povas partopreni nur tiu, kiu sukcese faris ekzamenon post la elementa kurso.

La esperantistoj el Dve Mogili korespondas

al ili pri paco, pri internacia solidareco kaj instruis ilin en Esperanto. Multaj el ili ankaŭ nun estas bonaj geesperantistoj. Pli malfrue, jam studento, Stojan estis agema esperantisto. Li korespondis kun eksterlandaj pacbatalantoj, tradukis multajn artikolojn por diversaj bulgaraj ĵurnaloj kaj revuoj.

Dum la aŭtuno de 1938 en la aŭditorioj de la Medicina Fakultato aperis alta junulo kun nigra kaj bukla hararo, kun grandaj nigraj kaj vivoplenaj okuloj, kvieta kaj koncentriginta. Baldaŭ ĉiuj estis mirigitaj de lia ĉiuflanka kulturo, sincereco kaj morala pureco. Tiu junulo estis Stojan Vasilev. Lia revo: fariĝi kuracisto kaj eklabori sindone intersiaj gefratoj — la ekspluatata vilaĝanaro.

Tuj post sia alveno en Sofio li komencis viziti regule la kunvenojn de la sofiaj esperantistoj ĉe „Alabin“ 50. Ofte li faris raportojn, gvidis kunvenojn, partoprenis aktive la vivon de la junaj esperantistoj.

Remsano (membro de RMS — Laborista Junulara Unuiĝo) ankoraŭ kiel

gimnaziano, en la Universitato Stojan estis aktiva membro de BONSS (Bulgara Ĝenerala Popola Studenta Unuiĝo). Studi kaj batali, batali kaj studi — tio estis lia ĉiutageco. Li partoprenis la amasan protestmanifestiĝon de la bulgara studentaro kontraŭ la barbara invado de faŝista Germanio en Ĉeĥoslovakion, skribis protestajn leterojn al tiamaj bulgaraj ministroj kaj parlamentanoj, poste — ankaŭ al germanaj oficiroj kaj soldatoj (li bone konis la germanan lingvon). Dum la postaj jaroj, kiam la faŝisma teroro ĉe ni pliakriĝis, Stojan fariĝis membro de antifaŝista batalgrupo. Tiutempe la batalgrupoj en la Medicina Fakultato estis organizataj de Slavĉo Radomirski kaj Stanjo Vasilev, frato de Stojan. La loĝejo de Stojan transformiĝis en deponejon de medicinaj iloj, medikamentoj kaj vestoj, kiujn li transsendis aŭ donis al eksterleĝaj batalantoj. En ĝi estis ankaŭ malgranda laboratorio por falsitaj legitimkartoj.

La 7-an de junio 1943 Stojan iris al renkontiĝo kun sia jam eksterleĝa frato

kun geamikoj el 20 landoj. Preskaŭ ĉiuj ricevataj leteroj estas legataj en la parolanta rondo.

Estas organizita gejunulara E-horo el 10 personoj, gvidata de Petro Genov. K-do P. Genov, vicprezidanto de la societa estraro, estis montrita kiel imitinda ekzemplo pro lia sindona laboro por Esperanto — plejparte li estas la organizanto de la E-grupoj kaj gvidanto de multaj E-kursoj.

Dum la jaro iuj k-doĵ havis karajn gastojn el eksterlando: N. Nejkov gastigis sian kolegon instruiston Bela Nagy kaj lian edzinon (Hungario), poste li kun sia edzino gastis al familio Nagy; familio Berne (Francio) gastis al d-ro Boĉev du semajnojn. Ĉi-somere estas planita reciproka gastado de lernantoj de k-doĵ N. Nejkov kaj B. Nagy.

En la kunveno k-ino Blaga Staneva — prezidantino de la loka virina sekcio de la Patrolanda Fronto, denove starigis la demandojn pri fakultativa instruado de Esperanto en Dve Mog'li, kie jam estas sufiĉaj kaj bonaj instruistoj-esperantistoj.

La jara kunveno finiĝis kun granda entuziasmo pri estonta E-laboro.

D-ro Z. B.

Loveĉ — E-Societo „Espero“. La jara kunveno okazis la 18-an de marto. Ĝi komenciĝis per belarta programo, plenumita de junpioniroj el lernejo „Nikola Iliev“, kiuj lernas fakultative Esperanton, kaj de esp-toj el la Aŭtomobila Uzino „Balkan“. En la estrara raporto, legita de Vasil Markov, prezidanto de „Espero“, interalie estas substrekita la sukcesa propagando de Esperanto en la urbo dum la lasta jaro. En la momento funkcias 9 kursoj de Esperanto. La plej bonaj gekursanoj estis premiitaj per libroj.

C. Kolarov

Samokov — „Rila Esperantisto“. La jaran kunvenon, okazinta la 22-an de marto, vizitis 50 geesperantistoj. Raporton pri la unujara agado tralegis Vasil Trifonov, prezidanto. La gvidanto de E-kurso en teknikumo „Nikola Vapcarov“ promesis membrigi ĉiujn siajn gekursanojn. Fine de la kunveno—belarta programo. Estis aranĝita ankaŭ tombolo.

Ĥr. Veceva

Pazarĝik — E-Societo „Radio“. La jara kunveno okazis la 23-an de marto. Samtempe—pridiskuto de la unujara agado de la Distrikta

Stanko sur unu el la sofiaj stratoj. Policanoj provis aresti ilin. Akra interbatalo. Eksiblis kugloj — Stojan faris ĉion eblan por savi sian fraton. Stanko sukcesis eskapi kaj kaŝi sin. Sed perfidula okulo vidis lin kaj post nova batalo li pereis. Unu esperantisto, unu sindona patrioto kaj brava batalanto kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo metis sian vivon sur la altaron de la popola libero. Nun lian nomon memore portas la Tramejo sur bulv. „Georgi Dimitrov“ en Sofio.

Stojan estis arestita. Nur li kaj la muroj de la faŝista arestejo scias, kiel li eltenis, nenion dirinte ĉe la torturoj por savi la vivon de siaj gekamaradoj. Poste — en la koncentrejon Enikjoj.

En decembro 1943 Stojan estis liberigita kaj revenis Sofion. Sed baldaŭ denove oni lin arestis suspektinte, ke li mortigis germanan oficiron. Preskaŭ du monatojn oni lin inkviziciis. Stojan estis malmola kiel ŝtalo. Li silentis, silentis. Je la 6-a de aprilo oni lin liberigis pro nepruviteco.

Malfortiginta, kun vundkovritaj piedoj kaj manoj, apoganta sin per bastono,

anstataŭ al vilaĝo Letnica, distrikto de Loveĉ, kie li jam havis lokon kiel kuracisto, Stojan revenis en sian naskiĝvilaĝon Kirilovo (nun Stojanovci), distrikto de Vraca. Sed mallonga estis la ĝojo de lia maljuna patrino. Post kelkaj tagoj li kun 6 gejunuloj el sia naskiĝvilaĝo, inter kiuj ankaŭ Radka, filino de lia pli aĝa frato Vasil, iris al la partizanoj de taĉmento „Georgi Benkovski“. Ĉi tie Stojan (kun partizana nomo Boĵo) estis modelo de disciplino kaj ofereco. En junio 1944 li fariĝis komandanto de la taĉmento, kiu jam nombris pli ol 120 gepartizanoj.

Je la 26 de junio en „Ĉerni Dol“, proksime de vilaĝo Brusen, distrikto de Sofia, post tuttaga batalo inter la partizana taĉmento kaj 750 policanoj kaj ĝendarmoj, pereis 19 fidelaj gefiloj. Inter ili — ankaŭ la amata komandanto.

Stojan Vasilev (Boĵo), tiu pura, nobla homo, tiu bonega popola filo kaj sindona esperantisto mortis por justo kaj libero, por sia alta komunisma idealo. Mortis — por vivi eterne en la memoro de nia libera popolo, en la memoro de la bulgaraj esperantistoj. *Anĉo Anĉev*



Komitato de BEA. Ĉeestis reprezentantoj el Plovdiv, Peŝtera, Velingrad, Bracigovo, el CK de BEA.

Raporton pri la agado de S-to „Radio“ faris la prezidanto N. Angelov. Raporton pri la laboro de DK — Ivan Vasilev. La diskutojn partoprenis ges-anoj P. Arnaudov, R. Georgieva, K. Konstantinov, Ĉavdarov, Al. Ivanov, St. Ganev — el Pazarĝik, Ŝterju Kukuŝev — el Peŝtera, Ivan Bataklijev — el Plovdiv, Asen Grigorov — el Sofio. Estis elektitaj estraroj: de „Radio“ — N. Angelov, prezidanto, Iv. Stranski — sekretario k. a.; de la Junulara Grupo — St. Ŝiškova — prezidanto, T. Todorov — sekretario k. a.; de DK — prezidanto — Petko Arnaudov, sekretario — Spas Popov, membroj — Ivan Vasilev — Pazarĝik, St. Kukuŝev — Peŝtera, Manol Ĉolev kaj D. Jdrakov — Velingrad, At. Pilev — Bracigovo, A. Kânev — Batak, Il. Rajkov — Strelĉa k. a.

R. Georgieva

Stanke Dimitrov — E-Societo „Marek“. La jarkunveno okazis la 30-an de marto. Raporton pri la agado faris la prezidanto Bano Banov. Nova estraro: Bano Banov — prezidanto, Boris Drenski — sekretario, virinfako — Katja Spasova, lernejoj — Vasil Gerginov, junularo — Dafinka Demirevska k. a.

B. Drenski

Vraca, gimnazio „Ĥristo Botev“ — Lernanta E-Societo „Verda Raketo“. La jara kunveno (18. III. 69) havis solenan karakteron — ja pasis la unua jaro, dekiam oni fondis la Societon. Ĉeestis pli ol 180 gelernantoj kaj instruistoj. En la prezidantaro sidis la direktoro de la gimnazio Slavĉo Zarkov. Salutis la kunvenon: en la nomo de CK de BEA Kunĉo Valev, la prezidanto de la Distrikta Komitato de Patro-

La jarkunveno de „Verda Raketo“

landa Fronto Ĥristo Panĉev, la prezidanto de DK de BEA Dimitr Sertov, la prezidanto de Poŝtista E-Societo „Ledenika“ en Vraca Todor Kaĉev.

Raporton pri la unuajara agado tralegis la lernantino Rosica Pavlova, prezidantino de „Verda Raketo“. Jen kelkaj faktoj: 150 regulaj membroj, 110 abonantoj al „Bulgara Esperantisto“, 2 sukcesaj E-ekspozicioj (okaze de la naskiĝtago de Zamenhof kaj dum la Semajno de Internacia Amikeco), 3 E-programoj po 25 minutoj pere de la urba radioreto, multaj materialoj aperigitaj en la loka ĵurnalo „Oteĉestven Zov“, aktiva korespondado kun esperantistoj el pli ol 50 landoj el la 5 kontinentoj, kvin tutaj klasoj kaj 1 ĝenerala grupo lernas fakultative Esperanton sub la gvido de Bojĉo Mladenov, instruisto en la gimnazio.

Estis elektita nova estraro. Regis granda entuziasmo.

La kunveno finiĝis per belarta programo.

M.

Sofio — Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“. La jara kunveno komenciĝis per belarta programo, plenumita de grupo de studentoj el E-Societo „Vela Peeva“. La raporton de la estraro pri la agado dum la unua jaro de S-to „Diĉo Petrov“ tralegis prof. d-ro Stojan Ĝuĝev, ĝia prezidanto. La S-to jam nombras 120 regulajn membrojn kaj disvolvas viglan kulturklerigan agadon. Ĝi havas bonajn ligojn kun la Urba Fakto „Popola Instruado“ kaj la Urba kaj Centra Komitatoj de la Profesia Unuiĝo de la Bulgaraj Instruistoj. La plej grava manko — tute nesufiĉa instruado de Esperanto al lernantoj. Sentata estas forte bezono de bonaj instruistoj.

Post la diskutoj oni akceptis la jenajn decidojn pri estonta agado: komenci plej obstine kaj zorgeme prepari E-instruistojn — ĉu per



TRA LA



MONDO

POLA TURISTA REVUO PRI BULGARIO

En n-ro 1 de „Bulgara Esperantisto“ ni publikigis intervjuon kun la pola esperantisto Ĉeslav Volčik pri lia vizito de la cent naciaj turistaj objektoj en nia lando, pro kio li ricevis la oran insignon de Bulgara Turista Asocio „Ekkonu la socialisman patrolandon!“

En la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ estas ricevita pola turista revuo „Swiatowid“, kiu en sia numero de 16 de februaro j. k. aperigas vastan intervjuon kun k-do Volčik pri liaj impresoj de Bulgario. La tuta numero de „Swiatowid“ estas dediĉita al Bulgario kiel lando de internacia turismo. Anoncita estas ankaŭ konkurso: „Kion vi scias pri Bulgario?“ La unua premio — unusemajna senpaga restado en nia lando.

IMPONAJ ATINGOJ EN EDUKAJ MEDIOJ

Televida vizito al mezlernejo en Wellington, **Novzelando**, kie oni instruas Esperanton, impone publikigis la notindajn atingojn de novzelandaj Esperanto-instruistoj. Dum la lasta jaro la nombro de novzelandaj lernejoj, en kiuj Esperanto estis instruata, altiĝis de 12 al 26.

En **Aŭstralio** okazis simile grava atingo: per unuanima decido la Lernejestra Asocio de Aŭstralio decidis oficialigi Esperanton kiel ekzamenan temon. Estontece estos eble instrui Esperanton kiel parton de la normala lernoprogramo.

Sed plej ĝojiga novaĵo estas tiu el **Sovetunio**. En la Litovia Respubliko la edukministerio decidis, ke Esperanto, kiel „la plej rapide akirebla lingvo en la mondo“, estas taŭga instrumento por mezlernejoj. Oni jam enkondukis ĝin en 19 mezlernejojn, sed plian progreson malhelpas la manko de instruistoj.

Ĉeestaj, ĉu per korespondaj kursoj, plivastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj, organizi kunlaboron de la lernantoj al „Graĵnoj en Vento“, plifortigi kaj laŭplane efektivigi metodikan labron per prelegoj, pridiskutoj de praktikaj lecionoj, divido de spertoj inter E-instruistoj, krei kontaktojn ankaŭ kun la Urba Komitato de Komsomolo ktp.

MALAGASA ESPERANTO-INSTITUTO FONDITA

Esperantista Asocio de Madagaskaro — unu el la du aliĝintaj landaj asocioj de UEA en Afriko — anoncis la fondon de „Malagasa Esperanto-Instituto“ kiel lingva instanco laŭ la modelo de Esperanto-Institutoj en diversaj eŭropaj k. a. landoj. La ĉefaj celoj de la nova instanco estas: gardi la lingvan unuecon, kontroli la instruadon de Esperanto en Madagaskaro, eldoni atestojn kaj diplomojn. Malagasa Esperanto-Instituto estas leĝe rekonita, kaj informoj pri ĝi aperis en la Ŝtata Bulteno de la Malagasa Respubliko.

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

Nia leganto J. Z. el Sovetunio interesiĝas pri la unuaj Esperanto-gazetoj en Bulgario. Nia respondo:

Unu jaron post la apero de la unua lernolibro de d-ro L. L. Zamenhof, en nia lando estis publikigita „Plena lernolibro pri la mondlingvo“ (1888) de Mileslav Bogdanov. En 1889 j. Bogdanov komencis eldoni la revuon „Mondlingvisto“, de kiu aperis nur 3 numeroj.

En 1902 komenciĝis aperado de grandformatigata ilustrita revuo „Rondiranto“ (3 jarojn).

En 1901—1902 aperas kelkaj numeroj propaganda senpaga ĵurnalo „Trumpetisto“.

Je la fino de 1903 literatura junula rondo en Sofio komencis eldoni litografie gazeton „Pârva Kraĉka“, kiu poste transformiĝis en „Unua Paŝo“ (1905—1906) — monata gazeto en Esperanto, ankaŭ litografie.

Fine de 1906 j. tiu ĉi rondo kunvokis en Sofion tutlandan E-kunvenon, kiu proklamis fondon de tutlanda E-organizaĵo kaj decidis eldoni organon — la gazeton „Bulgara Esperantisto“. En 1907 j. de tiu gazeto aperis nur 3 numeroj.

En 1906 j. en Târnovo komenciĝis eldonado de gazeto „Lumo“ — organo de la loka E-grupo. En 1907 j., post la E-kongreso en Târnovo, kiu definitive fondis nacian E-organizon — Bulgara Esperantista Ligo (BEL) — „Lumo“ fariĝis oficiala organo de la Ligo.

En 1910 „Lumo“ estis ĉesigita kaj kon-

Oni reelektis tutece la ĝisnunan estraron kun prezidanto prof. d-ro Stojan Ĝuĝev kaj sekretario Jordan Markov.

Fine oni akceptis telegramojn al la ministro de la Popola Instruado, CK de la Unuiĝo de la Bulgaraj Instruistoj kaj CK de Bulgara E-Asocio.

K. V.



La lingvo estas vivanta organismo. Al ĝi influas sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj. Tial ĝi konstante kaj daŭre ŝanĝiĝas. Ĝi ĉiam perfektigias kaj konformiĝas al la formoj de l'koncernaj epokoj. La lingvo evoluas.

Zamenhof genie komprenis la fundamentajn principojn de la vivanta lingvo. Pro tio li nur *iniciatis* la Lingvon Internacian kaj donis ĝin al komunaj uzo kaj prilaboro. Li diris ja ke: la formoj malnovaj arkaikigos kaj cedos al la novaj kaj modernaj formoj. Kaj tiel okazis.

PRAKTIKA PLIBONIGO

Praktika uzo kaj reĝustigo. Jen estas la plej severa kaj preciza kritiko. Ne vane Zamenhof dum longaj jaroj elparoladis en sia lingvo antaŭ ol aperi publike kun ĝi. Kaj multon ankoraŭ aldonis la ceteraj uzo kaj praktikado.

La malfacile elparolebla *h* malrapide, sed certe jam malaperas. Ĝin anstataŭis la facila kaj eleganta *k*. Tiel nun ni skribas: arkaika, mekaniko, tekniko, kemio, kimerio, krestomatio ktp, sed ne — arĥaika, meĥaniko, tehniko, ĥemio, ĥimero, ĥrestomatio ktp. La Zamenhof'a Ĥinujo fariĝis Ĉinujo kaj Ĉinio. Same ĥino — ĉino.

La finaĵo latina — *acio* en la praktiko montriĝis superflua kaj malbela balasto. Tial ni ne plu diras: *rezignacio, inaŭguracio, evoluacia, iluminacio, dekoraĉii, situacio* ktp, sed ni preferas la mallongajn: *rezigno, inaŭguro, evolua, ilu-*

mino, dekori, situo ktp. Ni same havas nun la formon abstini, abstinulo por la iamaj abstinenci, abstinenculo. Sed tamen la praktiko ne haltis tie ĉi, kaj ni parolas jam pri *kino, foto* kaj *aŭto*, sed ne pri *kinematografo, fotografaĵo* kaj *aŭtomobilo*.

NEOLOGISMOJ

La afiksoj esperantaj donas al ni tre vastan eblon de esprimado per minimuma vortaro. Tamen la ofta uzo kaj ripetado de l'afiksoj faras la frazon malbela, rigida kaj peza. Jen kial modernaj verkistoj kaj progresemaj esperantistoj prefere uzas:

trajno anstataŭ — *vagon-aro*

traŭbo — *vin-ber-aro*

humida — *mal-sek-eta*

gapi — *rigard-aĉi*

fekunda — *fruktodona*

eburo — *elefant-osto*

vito — *vinber-ujo*

bremso — *vagonar-halt-ig-ilo* ktp.

Ni ĉiam memoru la trafan konsilon de Ĉefeĉ: „En la lerta uzo kaj forlaso de nebezonaĵoj sufiksoj konsistas la bona Esperanto-stilo.“

KURAĜE KAJ ELEGANTE

La plej alta grado de posedo de iu ajn lingvo manifestiĝas en la parolado de l'homo. Inter ni troviĝas multe da samideanoj, kiuj skribe kaj komprene posedas Esperanton perfekte. Sed mallmultaj estas tiuj, kiuj egale bone parolas ĝin. Kial? Ĉar ni tre malofte havas la okazon uzi parole la lingvon.

cis aperi komuna organo de la bulgaraj kaj rumanaĵoj esperantistoj „Danubo“ kun bulgara-rumana redakta komitato kaj sidejo en Bukureŝto. Ĝi aperis ĝis 1912 j.

De 1912 ĝis 1918 j. Bulgario senĉese estis en milita atmosfero kaj la E-Movado estis preskaŭ detruita.

En julio 1919 j. aperis la unua numero de la nuna gazeto „Bulgara Esperantisto“ — oficiala organo de Bulgara Esperantista Asocio,

kiu kunligis la fortojn de ĉiuj E-generacioj ĉe ni — junaj kaj maljunaj.

Inter la du mondmilitoj en Bulgario aperadis kelkaj E-revuoj: „Esperantista Junularo“, „Balkana Laboristo“, „Mejdunaroden Ezik“, „Balkana Konkordo“, „Mejdunaroden Rabselkor“, „Fraterco“ k. a. Kelkaj bulgarlingvaj ĉiutagaj ĵurnaloj havis specialan paĝon pri la E-Movado — bulgara kaj fremdlanda.

Venelin Mitev

TUMULTO ĈE MANĜOTABLO

Kvin fingretoj petolemaj
saltis en legoman supon.
Pro ektimo falis cepo
el telero sur la jupon.
Krias beto kaj karoto:
— Nin atakas kaĉaloto!

*Ljudmila Jevsejeva,
Riga, USSR*

SAVINTO

En unu korto loĝis granda vila hundo. La mastrino de tiu domo havis ankaŭ kokidojn — etajn-etajn. La hundo tre-tre amis ilin — gardis kaj vartis, direktis kaj protektis. Se estis frosto, ĝi varmigis la etulojn per propra korpo.

Foje la mastrino foriris el la domo, kaj subite ekpluvegis. Ŝi rapide rekuris hejmen, timante, ke la senpovaj kokidetoj povas pereii. Kaj jen alkurinte ekvidis ŝi: la korto estas kovrita de akvo, kaj la birdetoj nenie estas.

Ŝi preteriris la hundodomon kaj vidis: la hundo kuŝas ĝisbruste en akvo, kaj sur ĝia dorso sidas malgrandaj flavaj buletoj — la kokidoj.

— Eĉ unu el ili ne pereis.

El „Por la paco“, IX, Moskvo, 1968

PRESERAROJ

Ni petas, korektu la ellasitajn erarojn (la grasajn literojn):

Kaj kiam ni havas ĝin — ni ne kuraĝas. Ĉiu bona esperantisto devas parole uzi nian lingvon flue kaj korekte. Kaj tio ĉi estas atingebla nur per atenta kaj insista ekzercado.

☐ Kuraĝe kaj elegante!

MODERNA ESPERANTO

☐ Sendube la stilo de Zamenhof restas nesuperita. Sed de tiam pasis multaj jardekoj. La lingvo ŝanĝiĝis. Ĉio estiĝis moderna. Ankaŭ Esperanto.

La moderna Esperanto troviĝas en la lastaj verkoj de niaj plej bonaj verkistoj originalaj. Ili estas: Julio Baghy,

ELEKTITAJ PROVERBOJ

Sen laboro — nenia gloro.
Ĉiu komenco estas malfacila.
Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon.
Kion vi juna lernis, tion vi maljuna scios.
En ĉiu aĝo kresku la saĝo.

LEĜOJ

— Panjo, nia instruisto diris al ni, ke se ne estus la leĝo de la gravito, ĉiuj homoj estus forĵetitaj desur la tero.

— Jes, tiel estas, mia kara infano.

— Sed kiamaniere la homoj sin tenis sur la tero antaŭ ol tiu leĝo estis voĉdonita?

1. En la kuko estas tro multe da glaso.

2. Li metis la bukedon en bluan vaton, kiun li plenigis per akvo.

3. Rapide li ŝovis la boaton en la muron, ensaltis kaj rimis per ĉiuj forkoj por savi sian vinon.

4. Hieraŭ en la teatro oni povis vidi la plej belan drakon en tiu ĉi sezono.

5. Kun granda intereso la knabino lekis la libron, poste ŝi iris en la lipon.

Kolomano Kalocsay, Edmond Privat, Jean Forge, Teo Jung kaj aliaj. Ilia stilo karakteriziĝas per sia mallonga kaj eleganta frazo. Tie regas la dinamikeco de niaj alarmaj tagoj. Tie dancas ĉiuj koloroj de la ĉielarko. Kaj el ĉio ĉi ŝprucas la aromo de la forpasintaj tagoj.

Ni legu la verkojn de niaj originalaj verkistoj. Ili donacas al ni modernan stilon kaj elegantan parolon. Kaj ni fariĝos bonaj esperantistoj.

*Parsifal (Stefan Masárov)
(„BE“, № 2—3, 1931 j.)*



Distro

REDAKTORO KAJ PLAGIATISTO

Al la redaktoro de Esperanto-gazeto venas juna aŭtoro. La maljuna redaktoro, fama aŭtoro de multaj libroj kaj libretoj, metis siajn okulvitrojn kaj komencis legi.

— Ĝi *vi* efektive verkis tiun ĉi poemon?

— Kompreneble, mi.

— Ho-o! Mi estas tro feliĉa konatiĝi kun vi, samideano Zamenhof! — ekkriis la redaktoro.

AMA LETERO

La filino legas ĝin tra la rozaj okulvitroj de la nesperta juneco: „Kara mia, donu al mi vian *manon*. Mi povas vivi nur *por* vi. Per *floroj* kaj *baloj* mi plenigos vian tutan vivon. Kun via *kiso* mi iros al la fino de la mondo!“

La patrino legas ĝin tra la malhelaj okulvitroj de la sperteco: „Kara mia, donu al mi vian *monon*. Mi povas vivi nur *per* vi. Per *ploroj* kaj *batoj* mi plenigos vian tutan vivon. Kun via *kaso* mi iros al la fino de la mondo!“

KONCIZE

„Paco“ — nova numero. Aperis nova duobla numero de „Paco“ — oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado, bulgara eldono, № 183—184, jaro XVI. Interalie ĝi enhavas: „En la fruntaj vicoj de la tutmonda pacmovado“ — de Georgi Pirinski, vicprezidanto de Bulgara Nacia Pacdefenda Komitato, „Unuigitaj en la batalo por paco“ — de Georgi Andreev, membro de la Tutmonda Packonsilio,

HUMORO EL LA MALNOVAJ PAĜOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

En ĉi tiu angulo ĉiu frato gajulo rajtas sidi kaj ridi.

MALSAĜULO

Du personoj renkontiĝis en mallarga strato kaj neniu el ili volis deiri flanken. Tiam unu diris fiere:

— Mi ne cedas al malsaĝuloj!

— Sed mi faras tion, — respondis la alia, deprenante ĝentile sian ĉapelon.

ĈU VI SCIAS, KE:

La horo loĝas en la horloĝejo.

Oficiro iras regule al sia ofico.

La cimbalo ne estas agrabia balo.

Du grandaj malamikoj en unu vorto estas muskato.

Revido estas ido de la revo.

Te-studo estas malfacila por la testudo.

Muzikisto estas vivanta per-sono.

Ter-mino povas esti ankaŭ en la terminaro.

Kiam la papo estos mortinta, se oni distranĉus lian korpon en multaj pecoj kaj se oni prenis unu el ili, tiam oni havus paperon; se oni prenis ĉiujn erojn, oni havus paperaron. La ago de la papo estas papago, kaj la avo de la papo estas papavo.

„Fratoj — agloj“ — de Orlin Vasilev, bulgara verkisto, „La arbo de amikeco“ — de T. Kulagin, letero el Irako de Husen Al-Amily, novaĵoj el la pacbatalo tutmonde, versaĵoj, recenzoj k. a.

Bela prospekto en Esperanto pri Ferfabrikoj „Klement Gotvald“ en Ostrava — Vitkovice aperis. Petu senpage ekzemplerojn je adreso: Dům kultury V Ž K G, Esperanto, Ostrava 1, Ĉeĥoslovakio.

V INTERNACIA ESPERANTISTA FERIO 16—29. IX. 1969, Mjendziguje, Pollando

Pitoreska montara ripozloko. Dum la lastaj jaroj unu el la plej popularaj E-aranĝoj en la mondo. La programo interalie: konsultaj horoj pri lingvaj demandoj, kursoj, prelegoj, internacia kaj pola vesperoj, lernado de E-kantoj, ekskursoj, dancamuzoj k. a.

Por bulgaroj 2-semajna restado kostas 33 levojn.

Detalajn informojn, aliĝilojn kaj invitilojn petu de: **Pola Esperanto Asocio, Okcidenta Regiono, Vroclav — 17, str. Dubois 3, Pollando.**

Ĉefredaktoro: Kunĉo VALEV

Redakta Komitato: Tatjana EVSTRATIEVA, Atanas LAKOV, Venelin MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV, Petr TODOROV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

En ĵurnalo „**Veĉerni novini**“ — Sofia (3. I. 1969) — en artikolo „La mondo konas liajn flamaĵojn“, dediĉita al la granda bulgara poeto Ĥristo Botev, la aŭtoro Jordan D. Nikolov notas, ke en Bulgario en 1928 aperis verskolekto kun E-tradukoj el la poezio de Botev.

En la sama ĵurnalo (20. II. 1969) — sciigo, ke estas malfermita filatela ekspozicio „Esperanto en servo de la paco kaj amikeco inter la popoloj.“

En la sama ĵurnalo (25. II. 1969) en la artikolo de V. Georgieva, titolita „Aŭtoroj kaj herooj“ (La tera lumo de la novaj homoj) — konversacio kun la verkisto St. C. Daskalov — la aŭtorino rakontas pri la nova romano de la verkisto kaj ke la ĉefa heroo Bratan malfermis kurson de Esperanto, estigis esperantisto.

En ĵ. „**Oteĉestven Front**“ (22. I. 1969) en rubriko „Recenzoj pri libroj“ la aŭtoro Ivan Udvarov en sia recenzo „La liberigita Prometeo“ rakontas, ke la ĉefheroo Bratan de la nova romano de Stojan C. Daskalov „Tera lumo“ lernas Esperanton.

En la sama ĵurnalo (26. I. 1969): G. Karakaĉanov el Ĥaskovo rakontas pri la IX Festivalo de la junaj esperantistoj, okazonta en Ĥaskovo de la 5—7 de aprilo ĉi-jare.

En ĵ. „**Ĥaskovska Tribuna**“ (1. II. 1969) — artikolo de Georgi Karakaĉanov dediĉita al la IX Festivalo de Bulgara E-Junularo, kiu okazos en Ĥaskovo en la komenco de aprilo 1969.

En la sama ĵurnalo (20. II. 1969) artikolo de Boris Kolev titolita „Amikeco trans landlimoj“ — dediĉita al la Semajno de Internacia Amikeco (16—22. II. 1969).

En ĵ. „**Zarja na Komunizma**“ — Loveĉ (8. II. 1969) — informo, ke dank' al la letero de la Ministro de la Komunikado oni malfermis kurson de Esperanto por poŝtistoj kun kursgvidanto Kolju Panĉev.

En ĵ. „**Sevlievska Tribuna**“ (15. II. 1969) — artikolo de Il. Iliĉev „Amikeco trans landlimoj“ — dediĉita al la Semajno de Internacia Amikeco.

En ĵ. „**Oteĉestven Zov**“ — Vraca (18. II. 1969) — raportajeto de R. Pavlova pri la aranĝoj de la Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ — Vraca okaze de la Semajno de Internacia Amikeco.

En ĵ. „**Dimitrovgradska Pravda**“ (20. II. 1969) — J. Zaprianov dediĉis sian artikolon „Amikeco trans landlimoj“ al la Semajno de Internacia Amikeco.

En ĵ. „**Trevnenski Zov**“ (20. II. 1969) — artikolo de Ivan Gamzov — „30 jarojn fenestro al la mondo“ — la aŭtoro rakontas la historion de E-Societo „Verda Standardo“ en Trjavna.

En ĵ. „**Pogled**“ — Sofio (17. III. 1969) — en redakcia artikolo sub titolo „La esperantistoj el „Verda Raketo“ kaj subtitoloj: „La lingvo de la lingvoj“, „Leteroj el Vraca al 64 landoj en la kvin kontinentoj“, „150 gelernantoj en unu gimnazio lernas Esperanton“ oni parolas tre favore pri la riĉa kaj varia agado de la Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en gimnazio „Ĥristo Botev“ — Vraca, en ligo kun ĝia unujara ekzistado. Estas donita ankaŭ foto el la granda ekspozicio de S-to „Verda Raketo“, aranĝita fine de la pasinta jaro je temo „Esperanto — fenestro al la mondo“.

En ĵ. „**Ŝumenska Zarja**“ (18. III. 1969) — artikolo de Vladimir Ĥristov — „Amikoj de la paco“ — la aŭtoro rakontas pri la E-agado de Ilija Andreev, Cvjatko Todorov kaj Asen Doĉev el Ŝumen.

En ĵ. „**Mladeŝka Iskra**“ — Ŝumen (27. III. 1969) — artikolo de Cvjatko Todorov — „Festivalo de la junaj esperantistoj“.

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ (30. III. 1969) — artikolo de Vasil Stoilov — „Palaco de la kooperativanoj“ — la aŭtoro rakontas pri la Sanatorio de la Bulgaraj Vilaĝanoj en la banloko Velingrad kaj interalie oni donas la opinion de franca esperantisto pri la tagoj, pasigitaj en la sama sanatorio.

En ĵ. „**Narodna Mladeŝ**“ (3. IV. 1969) — artikolo de inĝ. Nikola Uzunov pri la IX E-Festivalo de BEJ en Ĥaskovo.

FORPASIS NIA SOVETA AMIKO GRUŜKO

En Rostov na Don la 7-an de februaro forpasis nia soveta amiko Viktor M. Gruŝko, docento en la Konstruista Instituto. Malnova esperantisto (de 1926), li okupis ankaŭ la gravan postenon de sekretario de Sovetlanda E-Uniigo (1935).

Kiel sciencisto kaj fervora propagandisto de Esperanto k-do Gruŝko vizitis ankaŭ Bulgarion kaj lasis bonegajn impresojn inter la esperantistaro en nia lando.

FORPASIS LA SEKRETARIO DE MEM, PACAMIKO SABUROO

La 7-an de marto forpasis la elstara E-aganto Ito Saburoo, sekretario de MEM kaj ĝenerala sekretario de Japana MEM-Sekcio.

Li estis fervora adepto de Esperanto kaj ĝia apliko en la batalo por sekurigo de la paco. Largaj estis liaj ligoj kun neesperantistaj porpacaj tavoloj. Li organizis la partoprenon de japanaj esperantistoj en la batalo de la popolamasoj kontraŭ la krimoj de usona imperiismo en Vjetnamio kaj en Japanio.

Kune kun sia edzino li vizitis Bulgarion en 1967 kaj per sia modesteco faris fortan impreson al ĉiuj esperantistoj, kun kiuj li kontaktis.

Bulgara MEM-Sekcio